

Heinrich Heine,  
En nord' unu pino en solo  
*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

*Iomete ŝanĝita versio*

En nord' unu pino en solo  
Dormetas sur nuda altaĵ;  
Glacio kaj neĝa tavolo  
Ĝin kovras per tomba tolaĵ'.

Ĝi songas, ke palmo gracia  
Ĝi estas en orient',  
Eterne pri lando alia  
Sopiras ĝi en silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1023-2074 (2014-05-23 14:39:50)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliigis en 2014-05-23 la Zamenhofan tradukon tiel, ke la rim-skemo estas la sama kiel en la germana originalo.*

Heinrich Heine,  
Pinarbo staras sola  
*tradukita de Friedrich Pillath*

Pinarbo staras sola  
En nordo sur nuda altaĵ'.  
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio  
Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Songadas ĝi pri palmo  
Ĝemanta en orient',  
Soleca, sur arda deklivo  
En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

*Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html>.*